


Interpopola konduto de Edmond Privat aktualas ankoraŭ nun

De Andreas Künzli



Enkonduko

La libro *Interpopola konduto*, verkita en Esperanto de la svisa esperantisto *Edmond Privat* kaj publikigita en 1935 ĉe Literatura Mondo en Budapeŝto, estis franclingve konata sub la titolo *Le choc des patriotismes* kaj aperis en 1931 ĉe Filozofia Kolekto Félix Alcan en Parizo. En 1948 sekvis anglalingva adapto sub la titolo *The Clash of loyalties, a Lecture delivered to Annual Meeting of The Society of Friends Edinburgh*, eldonita de George Allen and Unwin Ltd en Londono. Tiu verko elstaris kiel originaleca, klarvida provo analizi la genezon de la malamo, perforto kaj milito inter la gentoj. Per ĝi Edmond Privat celis priskribi la problemojn de la naciaj fiero, vanteco kaj egoismo ĉe la popoloj, klopodis klarigi la erarojn de la patriotismo, naciismo kaj mesiismo, la sekvojn de la imperiismo kaj intencis montri la kontraŭdirojn de la nacia(j) moralo(j) en konflikto kun aliaj.

Kiel ideologo – aŭ filozofo – de la interpopola konduto, Privat akre kritikis la vantecan de la gentoj, la sovaĝecon de la militantaj civilizoj, la hipokritecon en diplomatio kaj nesincerecon en interŝtataj rilatoj. Li atentigis pri la malmoraleco en la politika kaj armea praktikoj kaj skurgis la ekscesojn rezultantajn el pasio kaj venĝo en la nomo de la „nacia religio“.

Edmond Privat (1889-1962) apartenis al multflanke interesataj kaj aktivaj personecoj kaj talentaj intelektuloj konataj en Svislando (precipe Romandio) kaj respektataj ankaŭ internacie. Kiel studento, historiisto, biografo, filozofo, aŭtoro kaj oratoro li disponis pri ampleksaj teoriaj scioj kaj konoj kaj praktikaj spertoj pri diversaj temoj. En siaj roloj kaj funkcioj kiel universitata instruisto, pedagogo, ĵurnalisto, verkisto, radiorektadoro, mondvojaĝanto, pacaktivulo, kiel partoprenanto en multaj konferencoj, Privat okupis gravajn poziciojn sen karierisma intenco kaj konatiĝis kun sennombraj eminentuloj de sia epoko. Kiel advokato de subpremataj nacioj, kiel mondfederisto, idealisto, socialismema demokrato kun liberalisma aŭ liberpensema sinteno kaj kiel pledanto por la homaj rajtoj, Privat estis admirata kaj laŭdata, sed liaj politikecaj ideoj kaj vidpunktoj estis neeviteble ankaŭ miskomprenataj kaj kritikataj kaj kaŭzis kontraŭstaron.

En kiuj rilatoj do konsistas la originaleco, unikeco kaj aktualeco de *Interpopola konduto*?

La titoloj de la unuopaj ĉapitroj donas imagon pri la temoj, kiujn Privat traktis en sia libro: Animo nacia, la gento, nacia vanteco, nacia vero, homoj kaj ŝtato, homaj oferoj, ŝtato kontraŭ ŝtato, eklezio kaj ŝtato, interna memkontrolo, klasa konscio, milito kaj revolucio, popola konduto en Hindujo, neperforto en Polujo, mesianismoj, ŝtatoj en societo, kontrolo kaj protekto, akiritaj kutimoj, novaj mistikoj, konkludo.

Privat klarigis en koncerna ĉapitro en alia libro, *Aventuroj de pioniro* (1962), ke li ekverkis en 1928 libron en la franca lingvo pri la konduto de nacioj inter si kaj pri la kolektiva psikologio de popoloj. Ĝi estis rezulto de studoj, observoj kaj spertoj. Privat estis instigita verki ĉi tiun libron, ĉar li okupiĝis pri la historio de la poplaj ribeloj naciliberigaj en Pollando kaj pri enketoj ĉe la slavaj popoloj de orienta Eŭropo, kiuj estis emancipiĝantaj ĉu de la rusa, prusa, aŭstra au turka jugoj.

Intermilita tempo

La jardeko 1929-39, en kiu Edmond Privat aktivis, verkis siajn artikolojn kaj eldonis siajn librojn, estis, rigarde al la mondpolitika kunteksto, tre malfacila historia periodo. Malgraŭ klopodoj reordigi kaj pacigi Eŭropon, nelaste helpe de Ligo de Nacioj, en Eŭropo restis la malnovaj antagonismoj kaj problemoj hereditaj de la unua mondmilito. La impresojn de la katastrofo de 1914-18 Eŭropo dum la intermilita tempo neniel digestis. La monda ekonomia krizo, eksplodinta en 1929, estis sekvata de galopanta inflacio, amasa senlaboreco kaj terura malriĉeco. La juna demokratio en la Vejmara Respubliko fiaskis, kaj la ekstremaj politikaj partioj radikaliĝis – en 1933 la povo estis transprenita de la „nacisocialistoj“ en Germanio, kiuj spronis la senekzemplan rasan frenezon kontraŭ la judoj kaj komencis militkrimi kontraŭ la popoloj de orienta Eŭropo. Inter la okcidentaj ĉefpotencoj Germanio, Francio kaj Anglio daŭre regis plena malfido. La jardeko evidente ŝatis la faŝimajn kaj aŭtoritismajn reĝimojn en Italio, Portugalio kaj en pluraj landoj de orienta Eŭropo. Hispanio vidis la internan militon, en Sovetunio instaligis la stalinisma diktaturo, la ideologia klasbatalo fariĝis nova religio. Ne ankoraŭ finiĝis la tutmonda koloniismo (Afriko aŭ Hindio kiel ekzemploj). Nelaste aperis interŝtataj konfliktoj ankaŭ en Sudameriko, ktp. Ĉi tiuj komplikaj konstelacioj, en kiuj la naciismo denove furoris kaj prosperis, kaj en kiuj militavidaj politikistoj estis senpaciencaj kaj kondukis fanfarone kaj agreseme, kondukis neeviteble al nova katastrofo por la homaro: la dua mondmilito en 1939-45. En la 20a jarcento Eŭropo fariĝis la „malhela kontinento“, kiel trafte rimarkigis la konata historiisto Mark Mazower.

Ligo de Nacioj

Interpopola konduto estas iusence ankaŭ la transformita protokolo aŭ respeguliĝo de la kunsidoj de Ligo de Nacioj, en kiuj Privat partoprenis kaj kie sidis ne nur la malnovaj grandpotencoj, sed ankaŭ la reprezentantoj de la novaj ŝtatoj de Eŭropo.

El tiuj observoj kaj spertoj Privat konkludis jene: „Mi povis observi la samajn fenomenojn kaj reagojn, ĉiam ripetatajn kaj konstante reokazantajn, kiuj ebligas ĝeneralajn rimarkojn pri la sinteno de nacioj kaj ilia mirinda malkapablo kompreni la sentojn de ceteraj popoloj, speciale de la najbaraj. Tre malfacile ili eĉ imagas, ke aliaj nacioj povas havi similajn sentojn kaj dezirojn kiel ili mem havas.“

Edmond Privat estis rekta atestanto de la ekesto kaj de la laboroj de Ligo de Nacioj, kiu estis fondita en 1918/20 kaj funkciis ĝis 1945 kun la celo eviti aŭ eĉ aboli militojn estontajn. Ĉi tiu mondorganizaĵo ja estis komplete nova sperto por la homaro kaj la diplomatio. Privat kritikis ĝin, ĉar laŭ li en ĝi blovis ne nur tro da naciismo, sed al ĝi mankis ankaŭ iu specifa spirito – li nomis ĝin mistiko – kiu naskus veran federacian senton ĉe la popoloj. La kondiĉo por atingi tiun celon konsistis ankaŭ en la efektivigo de la neŭtralismo.

Pri milito, moralo kaj naciismo

Privat difinis la militon kiel „la senteman punkton, kie du moraloj interbatiĝas kun siaj du kontraŭaj kutim-potencoj“.

En la ĉapitro 'La gento' Privat trafte emfazis la problemon de la koliziantaj moraloj:

„Sed, en ara konduto, eĉ pli frape sin montras nia du-ŝranka moralo. Ĉe la fino de milito, premita popolo postulas kontentigon de siaj sopiroj en la nomo de l'principo pri nacieco. Apenaŭ gajninta sian propran unuecon aŭ liberecon, tuj ĝi rifuzas al ceteraj la rajton profiti la saman principon. Tuj ĝi klopodas akiri kiom eble plej multe da teritorio kaj aneksi alilingvaj loĝantarojn sen ia konsidero al iliaj preferoj. Poste ĝi suferigas ilin ĝuste per la sama ĉikanado, pri kiu ĝi mem antaŭe plendadis...“

Aliloke en sia libro Privat skribis: „Kiel 'subpremataj' estas rekonataj nur la popoloj sub la regado de kontraŭulo. Kiujn turmentas la patrujo mem aŭ ties aliancanoj, tiuj ne havas eĉ rajton al ekzisto aŭ al justeco. 'Sed tio estas ja tute alia afero!' Tiun ĉi respondon vi aŭdos al ĉiuj rimarkoj. Kompreneble ĝi estas alia afero kaj kia estas do la fundamenta diferenco? (...)“ Privat elektis tiun ĉi ekzemplon en la kazo de Afriko.

Interese: En la 1990aj jaroj tiu fenomeno estis observebla ekzemple en la kazo de Estonio kaj Latvio, kies registaroj malĝentile rilitis al rusoj vivantaj en tiuj landoj. Post la sendependiĝo oni proklamis la rusojn eksterlandanoj, senŝtatanoj, rifuzante al ili la nacian pasporton, eĉ se ili tie naskiĝis kaj ĉiam vivis. Ĉar politikaj kondiĉoj la leĝoj ŝanĝiĝis. Moskvo, kiu pretendas protekti rusojn en eksterlando, sentis sin provokata kaj reagis per malamo, minacoj kaj ĉikanoj kontraŭ la baltaj ŝtatoj, dum eŭropaj instancoj devis interveni por solvi la akriĝantan konflikton. Se unu problemo estas solvita aperas alia.

Privat, la klera intelektulo, kapablis montri, per mirinde nekomplikaj frazoj kaj sennombraj praktikaj ekzemploj, la kontraŭdirecon de diversaj moraloj:

„Bravaj homoj batalantaj por liberigi sian nacion estas herooj por ĝi kaj honorindaj patriotoj, sed en la okuloj de ŝtato fremda, kiu okupas tiun landon, ili estas perfiduloj, ribelantoj kaj kondamnindaj krimuloj, kiuj meritas malliberigon.“ Plej aktuala tia ekzemplo estas Ruslando kaj Ukrainio.

Aŭ: „Ankaŭ la etiko, la moralo estas tre malsama, kiam temas pri individuo aŭ nacio. Agoj malmoralaj en individua vivo (mensogo, trompo, eĉ mortigo) fariĝas noblaj patriotaj agoj en batalo de unu nacio kontraŭ alia. La personaj virtoj de kuraĝo kaj fideleco, sinofero kaj malavareco estas tiam uzataj por servi kolektivajn egoismon, malammon kaj eĉ krimon.“

Falsa historiografio

Kompreneble el tio sekvas, ke inter rivalantaj grupoj gravas la pretendo de la vero: „Inter la faktoj ĉiu elektas la plaĉantajn kaj emas memori nur tiujn, kiujn li ŝatas kredi. Poste li trograndigas ilin kaj traktas kiel mensogojn flanke lasitajn“, Privat notis en la ĉapitro pri la nacia vero. Ĉi tiu problemo koncernas ekzemple historilibrojn, ĉefe lernejarajn, verŝajne en ĉiu lando de la mondo. Precipe gentoj, kiuj longe estis subjugataj, emas glori siajn proprajn fortojn kaj atingojn, emfazante la kulpojn de la subjugintoj kaj ignorante la meritojn de triaj roluloj. Ke „negativaj historiaĵoj rajtas okazi nur en la kontraŭa tendaro“, estas laŭ Privat ĉefa problemoj, kaj ke „la plej multaj popoloj sin taksas tre alte“, dum la najbarojn oni malestimas aŭ primokas. Alia obstaklo estas, ke en la lernejoj ni ne lernas la tutnecan historion, sed nur la historion de la propra nacio (aŭ gento) – jen grava diferenco. Kaj: „Nur unu historio rajtas estas vera, dum la aliaj estas fabeloj“.

Integra parto de la „prinacia religio“ estas la karikaturado pri aliaj. „En la nacia lingvo svarmas la esprimoj neĝentilaj pri aliaj popoloj“. Eĉ ne parolante pri naciaj himnoj, kiuj „rebriligas kolektivajn vantecojn kaj malamikecon al aliaj“. Ankaŭ la ĵaluzo kaj pasio ludas rolon. Memkritiko mankas plejparte. „La popolo estas edukata sen klopodo al scienca kontrolo. Certajn faktojn ĝi lernas. Aliajn ĝi ignoras (...)“, Privat admonis. Tial, konklude: „La nacia vero estas privata iluzio, nekompleta fabelo“.

Pri hipokriteco

Kelkaj aliaj ekzemploj el la spirita kolekto de Edmond Privat:

„Vi konas eble la respondon de l'afrika ĉefo, demandita, ĉu li punas kiel krimon la forrabon de alies edzino: 'Certe, li diras, t.e. se iu forŝtelas edzinon de mia gento, ĝi estas krima. Sed, se mi kaptas edzinon de alia gento, ĝi ne estas krima'“.

“Vidu pri armiloj. Tiuj de l'najbaroj nin timigas. Ni aĉetas do pluajn aviadilojn kaj pluajn militŝipojn, 'tion postulas sekureco'. Ke la najbaroj siavice maltrankviliĝos pri nia aĉeto, tia ideo eĉ ne venas en nian cerbon. (...) Tiel progresadis jam duonjarcenton la konkurado por armiloj. (...)“

Kaj Privat klarigis ankaŭ la logikon, kiu regas dum la senarmigaj konferencoj, kie neniu volas suferi la honton de malvenkisto, perdi sian propran prestiĝon aŭ ricevi truditajn kondiĉojn. En tiaj konferencoj Privat vidis la mankon de racio, „dezertan kampon“. Lia konkludo: „Enkonduki logikon“ en tiaj konferencoj signifus „kompletan revolucion“.

Manko de patriotismo aŭ fideleco en armeo estas severe punata. Sed „kiu trompas la poŝtan aŭ impostan oficejon, ne estas juĝata tiel severe“.

„Sendube ploris Maria-Terezia, hejme bonkora patrino, dum ŝi dividis Polujon kun Katarino kaj Frederiko. Sed ju pli ŝi ploris, des pli da teritorio ŝi prenis por Aŭstria Imperio.“

Do, per tiuj kaj similaj frazoj, Privat esprimis la esencon de siaj penso kaj kredo. La aŭtoro de *Interpopola konduto* pruvis, ke „la fama devizo *celo pravigas rimedojn* montras la frapantan kontraŭecon inter du malaj etikoj“. Tial, Privat multe revis pri „nacia gvidanto“, kiu renversas tiun sistemon kaj provas praktiki saman etikon por individuaj kaj naciaj agoj, kiu vere rompas la historian tradicion kaj enkondukas tute novan manieron en interpopola konduto“. Privat preferis la „unuecon moralan“, sur kiu baziĝis la movado de Gandhi kontraŭ la uzo de perforto en Hindio.

Privat pledis por la malaperigo aŭ reduktiĝo de la svisa armeo kaj por la enkonduko de utila civila helpservo anstataŭ armea deĵoro: „Malaperigu tiun armeon aŭ reduktu ĝin al dana formato kaj vi senigus tiel la svisan patriotismon de ĝia ĝisnuna koloro“. Ĉu la svisaj soldatoj komprenus tiun sugeston, alvokon?

Esperanto

Kaj ĉar en Ligo de Nacioj la oficialaj lingvoj estis la angla kaj franca, ekestus ne nur rivaleco inter la koncernaj nacioj, sed multaj malgrandaj nacioj povus kredi, ke temas pri afero de francoj, angloj kaj usonanoj.

Por akceli la internacian kunlaboradon inter la popoloj, Edmond Privat montris sin konvinkita, ke utilis enkonduki neŭtralan universalan lingvon kiel Esperanto. L.L. Zamenhof estis vera spertulo kaj fakulo pri intergentaj problemoj. Kiel bazo por lia projekto servis la humanisma etiko kaj la principoj de la universalismo kaj neŭtralismo. Kiel disĉiplo de Zamenhof, Privat pluevoluigis, aktuale reformulis kaj konkrete aplikis la teorion de la juda okulkuracisto en ĵurnalismo kaj politiko-diplomatio.

Kompare kun Esperanto, kiu „entenas ĝuste tiun amikeman mistikon – senkoleran kaj senmalaman“ – Privat konstatis la mankon ĝuste de tiu spirito ĉe Ligo de Nacioj „por varbi la koron de l’amasoj por lernejo kaj fervoro“ (vd. la ĉapitron pri ‘Novaj mistikoj’).

Pli alta moralo

Multaj eldiroj en *Interpopola konduto* en sia principo kaj en multaj kazoj validas ĝis hodiaŭ. Depost la dua mondmilito, almenaŭ en Eŭropo tamen okazis grava ŝanĝo en la primilita sinteno de la homoj. Dum iam „abomeno al milito“ sin turnis „kontraŭ la prinacia religio, kiu tro glorigis ĝin“, hodiaŭ en Eŭropa Unio, konsistigata de 28 pacamaj ŝtatoj, regas ĝenerale absolute kaj kelkfoje ekstrema kontraŭmilita sinteno. Ĉiuj membroŝtatoj de EU devigis sin laŭkonstitucie respekti la principojn de la paco, demokratio kaj homaj rajtoj. Eŭropon ligas tiuj valoroj. Bedaŭrinde, la kontraŭmilita sinteno ne tute ekskludas novan militdanĝeron, kiel montras pluraj ekzemploj. Laŭ la opinio de multaj, la militintervenoj en eksa Jugoslavio, en Irako, Libio kaj Sirio estas deciditaj kaj efektivigitaj sen respekto al la internacia juro.

Por bridi la blindan nacian pasion, Privat postulis en sia libro la konsideron de „interŝtata moralo“ kaj la starigon de „kuna tegmento super la naciaj plafonoj“, dum la ‘animo’, kiun kreis al si ĉiu popolo, necesus altiĝi al la sento pri supera kuneco“. Alie ĝi estus animo „ne kompleta kaj netaŭga por vivo en socio“. Privat bone konsciis, ke „la rilatoj inter la ŝtatoj estas ankoraŭ multe malpli progresintaj ol la rilatoj inter la homoj“ kaj ke la „diplomata gentileco inter ambasadoraj sinjoroj staras multe pli alte ol la bonvolo inter iliaj nacioj“. Finfine, Privat venis al jena konkludo: „Por kunvivi paco, necesas tute alia honorsento. Lojale plenumi promeson, digne malŝati venĝon, esti la unua, kiu rezignas regi la ceterajn aŭ ilin timigi perforte, jen honoro pli taŭga kaj inda je kulturnacio.“

Spiritaj heredoj kaj influoj

Kvankam la tipa skribstilo de Edmond Privat estas leĝera, *Interpopola konduto* ne estas tro facile digestebla legaĵo. La libro estu prudente traktata de homoj, kiuj havas vidpunktojn tradiciajn kaj konservativajn, ĝuste rilate temojn kiel ŝtato, religio, armeo, patriotismo. Por trafi la ĝustan aŭ ekskludi la maltaŭgan celpublikon, Privat intence atentigis en sia enkonduketo pri grava afero, nome ke en lia libro mankas insultoj por nutri naciisman pasion.

Por montri kiuj aliaj verkoj kaj verkistoj furoris en la tempo de *Interpopola konduto*, mi volas aldoni jenajn nomojn. En 1929 estis publikigita la fama romano *Im Westen Nichts Neues* (*En Okcidento Nenio Nova*) de *Erich Maria Remarque* (1898-1970). Aperis la libroj *The Sun Also Rises* (1926) kaj *A Farewell to Arms* (1929) de *Ernest Hemingway* (1899-1961), *Jahrgang 1902* (1928) de *Ernst Glaeser* (1902-63), *Krieg* (1928) de *Ludwig Renn* (1893-1939), *Heeresbericht* (1920) de *Edlef Köppen* (1893-1939), k.a. Ĉi tiuj signifaj beletraj verkoj reagis ĉefe al la traŭmato de la unua mondmilito, priplorante la perditan generacion kaj akuzante la krimojn de la militbuĉado. Nelaste indas menciigi la verkiston *Joseph Roth* (1894-1939), kiu trafe karakterizis, ekzemple en sia libro *Die Flucht ohne Ende* (1927), la cinikan (sin)trompemon ĉe kelkaj reprezentantoj de la tiama 'supera socio'.

Ankaŭ *Interpopola konduto* apartenis al la kontraŭmilita respektive porpaca protestliteraturo, sed ĝi reprezentis iom alian ĝenran kaj idean tradicion, traktante multe pli ol nur la militon mem. Kiel multflanka verkisto kaj ĵurnalisto, kiu samtempe rolis kiel pedagogo-instruisto, Privat verkis per *Interpopola konduto* ankaŭ utilan lernolibron pri prevento de militoj. Ĝiaj instruoj estas influitaj de la humanisma pensado de famaj pacaktivuloj kaj teoriuloj de la neperforto, de socialismemaj demokratioj, kvakeroj, civilservistoj, idealistoj, mondfederistoj, humanpolitikistoj k.a. Jen kelkaj nomoj kaj fontoj el la spirita heredaĵo de Privat kaj ties verkoj: Thomas More (1478-1535), William Penn (1644-1718), Romain Rolland (1866-1944), Lanza del Vasto (1901-81), Danilo Dolci (1924-97), Abato Pierre (1912-2007), Louis Lecoin (1888-1971), Woodrow Wilson (1856-1924), Auguste Forel (1848-1931), Pierre Bovet (1878-1965), Pierre Cérésolle (1879-1945), Fridtjof Nansen (1861-1930), Mohandas Karamchand Gandhi (1869-1948), Vinoba Bhave (1895-1982), Tomáš Garrigue Masaryk (1850-1937), Lev Nikolaevič Tolstoj (1828-1910), L.L. Zamenhof (1859-1917), kaj aliaj. Privat studis la doktrinojn de la tiĉina anarkiisto Louis Bretoni (1872-1947), legis la instruojn de la zurika teologo Hermann Kutter (1863-1931), kiu reprezentis la germanan kristanan socialismon, kaj sekvis la pacpredikojn de Paul Pettavel (1861-1934) en La Chaux-de-Fonds. La konatiĝo kun la filozofo kaj psikologo William James (1842-1910) en la harvarda universitato (1908), unu el la fondintoj de la pragmatismo kaj radikala empirismo, la renkontiĝoj kun la elstara franca socialisto kaj oratoro Jean Jaurès (1859-1914) kaj kun Rabindranath Tagore (1861-1941) postlasis profundajn impresojn ĉe la aŭtoro de *Interpopola konduto*.

Eĉ se ĝi eble ne liveris la plej konsekvencan proponon por solvi la militojn mem, *Interpopola konduto* estis kuraĝa libro – tion devis konfesi ankaŭ la recenzanto en la ĝeneva gazeto *Nouvel Essor*, en kiu en 1932 aperis lia kritiko de la franca libroeldono. Por konstrui pli bonan, pli pacan mondon, Privat sugestis la principojn de la universala federacio, de la internaciismo kaj neŭtraleco, de la tolerado kaj kontraŭhegemoniismo. Pro tio li apartenis al la avangardaj progresemluloj de sia epoko. Kaj tial ne estas mirinde, ke la libro malplaĉis ekzemple al la „nacisocialistoj“ de Hitlero, kiuj ordonis en 1941 detruigi la librostokon en la pariza eldonejo, kie aperis *Interpopola konduto*. La eldonejo poste ne reelonis ĝin. Sed grandparte dank' al la esperantistoj, kiuj tenas la memoron de Edmond Privat en honoro, la teksto restis neforgesata.

© Andreas Künzli 2005, 2016

La teksto de la libro *Interpopola konduto* en nova eldono estas havebla ĉe:
<http://katalogo.uea.org/katalogo.php?inf=7554>